

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1082 (9/2021)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- UEA: mesaĝo al UN kaj UNESKO okaze de la Internacia Virina Tago 2
- INK: Interkultura Novelo-Konkurso 3
- Meza kurso en Padova kaj Skajpo 4
- IEJ nei decenni, evento Zoom 4
- Nuova trasmissione su Rai Radio 1 4
- Seminario pri Didaktiko 4
- Sukcesa agado de UEA ĉirkaŭ la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo... 5
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton 6
- Vanity Fair pri la rolo del la lingvoj en la labormarkato 7
- Pillole di Salvezza 1082: Nikolaj Gogol 7

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO: MESAĜO AL UNUIĜINTAJ NACIOJ KAJ UNESKO OKAZE DE INTERNACIA VIRINA TAGO, 8 MARTO 2021



Universala Esperanto-Asocio

Universala Esperanto-Asocio ĉiujare partoprenas kun entuziasmo la festadon de la Internacia Virina Tago. Tiu tago estas okazo por pritaksi la progreson faritan survoje al forigo de diskriminacio kontraŭ virinoj kaj knabinoj, kaj insisti pri iliaj egalaj rajtoj. Ĝi estas ankaŭ okazo por konsideri la longan vojon al egaleco, kiu ankoraŭ irendas.

La sanitara krizo generita de Kovim-19 aparte influis virinojn, kiuj estis trafitaj je pluraj flankoj, interalie ekonomia, labora kaj familia. La pandemio plifortigis ekzistantajn malegalecojn kaj riskas subfosi, almenaŭ parte, la progresojn de la lastaj jardekoj rilate al seksa egaleco.

La kronviroza krizo plividebligis la neproporciajn ŝarĝojn portatajn de virinoj kaj ilian vundeblecon al diversaj formoj de diskriminado kaj perforto, sed ankaŭ montris ilian forton kaj neanstataŭigeblan rolon en la socio. Virinoj elstaris kiel iuj el la plej ekzemplaj kaj efikaj landaj gvidantoj kontraŭ la pandemio. Lokaj virinrajtaj organizoj, virinaj grupoj kaj transnaciaj feminismaj movadoj ne haltigis sian laboron, reagis forte al la krizo, kaj eĉ atingis historiajn sukcesojn en kelkaj landoj.

Ankaŭ en la Esperanta komunumo sentiĝas pli kaj pli la bezono de egaleco, kio iĝis centra temo de retaj diskutoj, laborgrupoj, prelegoj, projektoj. Ĉefe inter la junularo, virinaj gvidantoj kaj aktivuloj elstariĝas pro sia kapablo teamlabori kaj esti motoroj de ŝanĝo.

En ĉi tiu Internacia Virina Tago, ni rekonas ilian altvaloran kontribuon kaj samtempe la neceson pli forte labori por superi la daŭre malproportcian reprezentadon de la seksoj en nia movado, kreante pli inkluzivan kulturon. Jam ekde ĝia plej frua historio, la Esperanto-movado celas esti loko en kiu "homoj kun homoj" renkontiĝas, interkonatiĝas, lernas unu de la alia, preter la naciaj limoj kaj lingvaj baroj. En tiu strebo al diverseco la genra dimensio nepre ne estu forgesita.

La Internacia Lingvo Esperanto prezentas unikan okazon por vere tutmonda dialogo pri la vojo irenda – dialogo per unu tutmonda lingvo, kiu tuŝas ĉiujn landojn kaj kontinentojn, kaj kiu rekte kontribuas al malferma kaj inkluziva debato engaĝanta la tuttergloban civilan socion – debato kerna al la celaro de Unuiĝintaj Nacioj.



Interkultura Novelo-Konkurso (INK) estas konkurso organizata de Akademio Literatura de Esperanto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio, celanta instigi aktualan novelan kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj. Sama temo, malsamaj vidpunktoj, malsamaj historioj...

La temo de la konkurso estis voĉdonita rete: "KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin". Aŭtoroj estas nun invitataj verki novelojn pri ĉi tiu temo kaj sendi ilin per reta formularo antaŭ la 20-a de junio 2021.

Pensu: la nova koronaviruso, kiel ĝi ŝanĝis vian vivon aŭ la mondon? Per ĉi tiu temo, vi povas trovi inspiron por skribi fikcian rakonton okazantan en la pasinto (dum la unuaj – kelkfoje frenezaj – monatoj de la pandemio), nuntempe (kiam pandemio iĝis preskaŭ kutima afero de la vivo) aŭ en la estonto (post jaroj, jardekoj aŭ eĉ pli... kia estos nia mondo?)

La tekstoj havos maksimume 12 000 karaktrojn (proksimume 6 paĝoj). Ne estas minimuma longeco. Poste, interkultura ĵurio taksos la novelojn kaj anoncos gajnintojn dum la 107a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio en Montrealo, somere 2022. La aŭtoroj de la tri gajnintaj noveloj ricevos premion de 500, 300 kaj 200 eŭroj, respektive. Finalistajn novelojn oni povos legi en rete publikigota novelaro.

Ĉu vi ŝatas literaturon, novelojn, novelkonkursojn, INK-on? Ni volas aŭdi pri vi!

Akademio Literatura de Esperanto

www.akademio-literatura.org

info@akademio-literatura.org

Amike,

Nicola Ruggiero

Estrarano de Akademio Literatura de Esperanto

<https://www.akademio-literatura.org>

MEZA KURSO EN PADOVO KAJ SKAJPO

Duagrada kurso komencoĝs la 21an de marto 2021, inter la 15a kaj la 17a. kaj finiĝos en februaro 2022a; temas pri 12 lecionoj. Ĝi okazos ĉe la Asocio Giordano Bruno en Padova, kaj per Skajpo. Instruistino D-ino Paola Tosato, kiun bonvolu kontakti por informoj kaj aliĝoj: paolatosato@hotmail.com.

IEJ NEI DECENNI, EVENTO ZOOM

Il 16 marzo prossimo, alle 21, Pierre Caliori, presidente IEJ, incontrerà alcuni presidenti IEJ dei decenni passati per uno scambio di idee e informazioni. Saranno presenti: Francesco Amerio, Dario Besseghini, Guido Carravieri, Flavia Dal Zilio, Francesco Pignatelli. Tra il pubblico ci saranno altri presidenti IEJ come Norberto Saletti. Aprirà la serata e presenterà gli ospiti il presidente della FEI Luigi Fraccaroli, anche lui già presidente IEJ.

<https://us02web.zoom.us/j/84398051900>

NUOVA TRASMISSIONE SU RAI RADIO1

Cari amici, abbiamo registrato una nuova trasmissione per Rai Radio 1, questa volta sul tema dei nuovi mezzi di comunicazione, social, e loro utilità per il mondo esperantista. Ringrazio Sonia Marino e Gianantonio Pflieger che hanno accettato di partecipare facendo conoscere le loro esperienze.

La trasmissione verrà messa in onda **domenica 14 marzo alle ore 23.50 su Rai Radio1**. Mi raccomando ascoltate e fateci sapere la vostra opinione: questo ci aiuterà a migliorare il nostro lavoro.

Michela Lipari

SEMINARIO PRI DIDAKTIKO

FEI organizas retan seminarion pri didaktiko de Esperanto; ĝi okazos pere de reta programo ZOOM (facile elŝutebla per komputilo, tabul-komputilo kaj poŝtelefono) la 10an kaj 11an de aprilo 2021 de la 15:30a ĝis la 18:30a. Ne maltrafu la okazon partropeni senpage en la seminario gvidota de nia trejnita instruisto pri lingvopedagogio Patrick Morando. Aliĝu tuj, oni akceptos nur la unuajn 25. La programo inkluzivos teorian parton kaj praktikan ekzercadon. Ni havos la eblecon paroli pri historio de didaktiko, ekkoni la fundamentojn de diversaj instrumentoj, amuziĝi kaj, laŭplaĉe, sperti, en etoso de kuna lernado, praktikan instru-ekzercadon. Por aliĝi, skribu al: paola.nigrelli@esperanto.torino.it. Vi ricevos detalan programon post la aliĝo. Kaptu la okazon, ni atendas vin!

La instru-komisiono de FEI

SEMINARIO TEORICO-PRATICO DI DIDATTICA

Ricominciano i seminari FEI di DIDATTICA: NON PERDERE L'OCCASIONE di partecipare GRATUITAMENTE al prossimo SEMINARIO il 10 e 11 aprile 2021 dalle 15,30 alle 18,30 che si terrà in rete sulla piattaforma ZOOM (programma facilmente scaricabile su PC, TABLET, e CELLULARI) e che sarà guidato dal nostro insegnante PATRICK MORANDO. Il programma prevede una parte di teoria e una di pratica. Avremo l'occasione di parlare di storia della didattica, di scoprire i principi basilari dei vari metodi di insegnamento, ma anche, se lo vorremo, di divertirci in un clima di reciproco apprendimento, simulando una lezione. Che aspetti dunque? Iscriviti subito ci sono soltanto 25 posti. Scrivi a: paola.nigrelli@esperanto.torino.it

Riceverai il programma dettagliato insieme alla conferma della tua iscrizione. Non mancare, ti aspettiamo! La commissione insegnamento della FEI

SUKCESA AGADO DE UEA ĈIRKAŬ LA INTERNACIA TAGO DE LA GEPATRA LINGVO

Ĉiujare UEA organizas agadon ĉirkaŭ la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, la 21-a de februaro. Ĉi-jare la agado de esperantistoj lige kun UEA estis aparte sukcesa. UEA mesaĝis pri la Tago jam la 5-an de februaro (<https://uea.org/qk/929>), du semajnojn pli frue ol la koncerna dato, kio ebligis al kunlaborantoj traduki kaj dissendi la mesaĝon per diversaj kanaloj, aldone al la versioj en la angla kaj en la franca, kiujn UEA formale sendas al UN kaj Unesko pere de sia oficejo en Novjorko. Ĉefa aganto por tio estas Humphrey Tonkin, komisiito de UEA pri Rilatoj kun UN kaj Honora Prezidanto de la Asocio, kunlabore kun la grupo Esperanto por UN (<https://esperantoporun.org>). Tre speciala atingo estis tio, ke la versioj kaj originalo en Esperanto aperis en anglalingva novaĵletero de la Departamento de Monda Komunikado: <https://mailchi.mp/un/announcements-for-civil-society-15-february-301870?e=a223405214>.

Alia motoro de la agado estas Renato Corsetti, eks-prezidanto de UEA kaj helpanto pri pluraj agadkampoj, inter ili Informado. Corsetti subtenis ne nur la diskonigon kaj tradukadon de la mesaĝo de UEA, sed ankaŭ de la afiŝo de UEA pri la Tago. Ĉi-jare la plurajn versiojn de la afiŝo eblas trovi en la Vikio de UEA (<https://uea.org/vikio/Gepatra-lingvo-tago-2021-02-21>). Ĝi aperis en almenaŭ 39 lingvoj, pri kio multe laboris la grafikisto Peter Oliver, kiu akiris la fotojn kaj produktis la plurajn versiojn kaj formatojn de la afiŝo. Aldone al la Vikio, ĉiuj afiŝoj estas elŝuteblaj el reta dosierujo pretigita de Mariana Evlogieva. Ĝis la fino de februaro la komunikado de UEA al UN estis tradukita al almenaŭ 14 lingvoj. La Esperanto-originalo troveblas kiel Gazetara Komunikado de UEA kaj en la retejo UN Esperante (<https://unesperante.wordpress.com>), zorge tenata de Rafael Lima. Helpe de Scott Turton, la retejo Esperanto por UN aldone aperigas la versiojn en la angla kaj franca. Voĉlegita versio fare de la dua Vicprezidanto de UEA, Trezoro, disponeblas en la kanalo UEAviva ĉe YouTube (<https://youtu.be/4otfNlwNxTU>) kaj aliaj versioj estas elŝuteblaj ĉe la Vikio de UEA (https://uea.org/vikio/Komunikado_2021). La afiŝo aperis en la reta revuo

Esperanto (<https://revuoesperanto.org/node/682>), ĉe sociaj retoj kaj presite ĉe kelkaj lokoj, kun speciala atentigo al la agado de Zsófia Kóródy en Herzberg am Harz, kiu ĝin aperigis en pluraj lingvoj en la informkesto antaŭ la urbodomo de la "Esperanto-urbo". La mesaĝo kaj afiŝo estis dissenditaj al organizoj kaj ĵurnalistoj fare de kelkaj esperantistoj kaj landaj asocioj en Europo kaj en Ĉinio. La prezidantino de Ĉina Esperanto-Ligo, Chen Ji, aparte atentigis pri diskonigo al ĉinaj neesperantistoj en ĉinaj kanaloj kaj ĉe la spacoj Ĉina Fokuso kaj Ĉina Esperanto-Ligo ĉe Facebook. En Brazilo la Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro, membro-asocio de Brazila Esperanto-Ligo, organizis en la portugala retan debaton inter la universitataj profesoroj Fernando Pita kaj Guilherme Fians kaj loka politikisto Reimont Luiz, sub la temo "Protekto de gepatraj lingvoj kaj la rolo de Esperanto". Por UEA tiu agado estas sukcesa ne nur pro la atingoj ĉe UN, pri kio la Asocio kore dankas al siaj reprezentantoj ĉe UN (Novjorko) kaj Unesko (Parizo). Sed ankaŭ pro la unuiĝo de esperantistoj, kiuj diversflanke kaj diversmaniere alportis siajn kontribuojn. Aparte notindas la nombro de lingvoj el Barato, en kiuj aperis la afiŝo, kaj la provoj de parolantoj de minoritataj lingvoj en Pakistano kaj en Irano. Pro tio UEA same dankas al ĉiuj diskonigintoj kaj ĉiuj tradukintoj. Tiun kaj aliajn agadojn de UEA vi povas subteni per (re)aliĝo al la Asocio (<https://uea.org/alighoj/alighilo>) aŭ per donaco al niaj fondaĵoj, inter ili Novjorka Oficejo, Unesko kaj Informado (<https://uea.org/alighoj/donacoj>).

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON

Sinceramente, la cucina croata me la ricordavo più buona...



VANITY FAIR PRI LA ROLO DE LA LINGVOJ EN LA LABORMERKATO

Kadre de la tago de la gepatra lingvo, Vanity Fair publikigis tiun artikolon pri la valoro de la itala lingvo en la labormerkato. Mi modeste kontribuis al ĝi.

Michele Gazzola

<https://www.vanityfair.it/mybusiness/news-mybusiness/2021/02/21/lingua-italiana-cercare-lavoro>

PILLOLE DI SALVEZZA 1082: NIKOLAJ GOGOL

Il 4 marzo è l'anniversario della morte (nel 1852) dello scrittore Nikolaj Vasiljevič Gogol(1809-1852)

it.wikipedia.org/wiki/Nikolaj_Vasil%27evi%27C4%8D_Gogol%27

Sulla sua nazionalità ci sono contrasti: infatti, nacque in un villaggio che all'epoca faceva parte dell'Impero russo, ma oggi è in Ucraina centrale. Era di famiglia ucraina, ma visse lungamente a San Pietroburgo, scrisse in russo e morì a Mosca. Il bicentenario della sua nascita, nel 2009, fu quindi occasione di reciproche rivendicazioni tra Russia e Ucraina. Addirittura si discute del suo nome, che è normalmente citato nella forma russa, ma che in ucraino è Mikola Vasiljovič Gogol.

Le sue opere più note sono la commedia "Revizor" (Il Revisore) e il romanzo "Mjórtyvje dúshi" (Anime morte), tradotte anche in Esperanto. "Il Revisore" è stato tradotto dallo stesso Zamenhof, con il titolo "La revizoro" (corrispondente a quello russo). La versione in Esperanto fu prima pubblicata a puntate, a partire dal settembre 1906, su "La Revuo", che si apre proprio con quest'opera), e poi apparve in volume nel 1907.

Un'altra traduzione, di Aleksander Korĵenkov, è stata pubblicata nel 2003 (in "Rusa Novelaro – Sezonoj") con il titolo "La palto" (Il cappotto), corrispondente a quello con il quale la commedia è più nota in italiano. Una curiosità: nel 1952, il regista italiano Alberto Lattuada trasse dalla commedia di Gogol un film, intitolato "Il cappotto", interpretato da Renato Rascel in un ruolo insolitamente drammatico.

Alleghiamo:

– una busta filatelica sovietica del 1959 in occasione del 150° anniversario della nascita dello scrittore (l'annullo è del villaggio natale; da notare che l'iniziale del nome è "M" come Mikola, in ucraino).

